



# VENEZUELA STELO

43a jaro. Nro 97a. 1a semestro 2016

Organo de Venezuela Esperanto-Asocio

ISSN 1316-0451

## 11a Venezuela Renkontiĝo de Esperanto, Merido 2016



11° ENCUENTRO  
VENEZOLANO  
DE ESPERANTO

11.ª VENEZUELA  
ESPERANTO-  
RENKONTIĜO



26-28 de  
Agosto Aŭgusto  
MERIDA, VENEZUELA.  
2016



La plej alta telero de la mondo jam pretas por la renkontiĝo

# Enhavtabelo

Noticias en español 3

Briteliro Manuel Ortega 5

Duolingo por hispanparolantoj  
Isaac Santiago 6

La plej alta telfero el la mondo leviĝas en  
Venezuelo Andrea Araque 8

11a Venezuela Esperanta Renkontiĝo 10

Potosí, la Venezuela Atlantido  
Isaac Santiago 12

La 68<sup>a</sup> Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso  
Reportas: Liba Gabalda 13

La Kvatro Jezer Dorante 16

Kranio, ludo en Esperanto Isaac Santiago 16

Por qué Esperanto... 17

Directorio de Asociaciones en América 18

Esperanto: Movimiento internacional 19



Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.

Telefonnumero: 58-0212.662.9224

[www.esperanto-venezuela.org](http://www.esperanto-venezuela.org)

[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)



Venezuela Esperanto-Asocio membriĝis  
al UEA ekde 1978.

**Estraro:**

**Prezidanto**

Ricardo Coutinho.

**Vic-Prezidanto**

Juan Miranda.

**Ĝenerala Sekretario**

Elsa Angulo

**Kasistino**

Elizabeth Miranda.

**Aldelegito pri Publikigado**

Nancy Aquino

**Delegitoj regionaj**

Isaac Santiago (Merido)  
Chistian Ponisio (Maturino)

**Grafikisto kaj kunredaktisto**

Isaac Santiago

**Ĉefredaktisto**

Ricardo Coutinho

## ¿Quieres saber más sobre el Esperanto?

El Esperanto es un idioma planificado, creado en 1887 para servir como idioma neutral internacional. Su gramática sencilla facilita su dominio rápido. Su flexibilidad lo convierte en una lengua ideal para la traducción y la creación literaria. Si quieres saber más sobre este idioma fascinante, escribe o dirígete a la **Asociación Venezolana de Esperanto**.

*Venezuela Stelo* es el órgano difusor oficial de la **Asociación Venezolana de Esperanto**. Esta revista está escrita en esperanto, conteniendo artículos de interés nacional e internacional.

Para saber más visita: [www.esperanto-venezuela.org](http://www.esperanto-venezuela.org)

Y también el Directorio en las páginas 18 y 19 de este número.

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondecas iliaj aŭtoroj. Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.



## Noticias en español

Con motivo del 400º aniversario de la muerte de Miguel de Cervantes Saavedra, la versión en Esperanto de **Don Quijote de la Mancha** ahora está disponible de forma gratuita en la página oficial de la Biblioteca Virtual Miguel de Cervantes.

<http://www.cervantesvirtual.com/obra/la-ingenia-hidalgo-don-quiote-de-la-mancha/>

Todo listo para el lanzamiento del curso de Esperanto para hispanohablantes en **Duolingo**, la aplicación Android para el aprendizaje gratuito de idiomas más usada a nivel mundial. Se espera su lanzamiento el 08/08/2016. [www.duolingo.com/](http://www.duolingo.com/)

Lernu.net la principal página web para el aprendizaje del Esperanto, ha actualizado su portal, dispone de nuevos cursos además de los clásicos. [www.lernu.net/es](http://www.lernu.net/es)

El 101º Congreso Universal de Esperanto en Nitra - Eslovaquia contó con la participación de 1.221 esperantistas de 60 países. Su inauguración fue transmitida en vivo por Youtube. La sede elegida para el 103º Congreso en 2018 fue Lisboa-Portugal.



Curso de Esperanto en la Universidad de Oriente en Ciudad Bolívar con el Profesor Jesús Cedeño, este curso se imparte como materia electiva desde el 2006. En esta ocasión contó con 50 alumnos en dos secciones.



La Asociación Venezolana de Esperanto les invita a participar en 11° Encuentro Venezolano de Esperanto, en mismo se realizará en la ciudad de Mérida, los días 26, 27 y 28 de Agosto 2016.

El participante disfrutará de un habiente intelectual, donde aprenderá cosas nuevas, se entenderán con el movimiento y gozará de un ambiente musical y ameno.

**Costo de inscripción:**  
Asociado: 5000 bolívares  
No-asociado: 6500 bolívares.  
Recargo para quienes coticen después del 15/08/2016.

Los participantes recibirán: distintivo, libreta de notas con el logo del encuentro, refrigerio del viernes y transporte para el cierre.



La Esperanta Flago sobre los 4.765 metros.



Talleres y reuniones en la Asociación Venezolana de Esperanto.



Algunos encuentros de Esperantistas.



# Briteliro Manuel Ortega

## La lingva debato reviviĝas

Unu el la sekvoj de la Briteliro estis la revivigo de la lingva debato en Eŭropa Unio. Nu kelkajn tagojn post la referendumo en Britio eŭropdeputitoj kaj politikistoj en Eŭropo malkaŝis unu el plej grandaj minacoj por demokratia praktiko en la Unio: la lingva malegaleco.

Esplorado de la Eŭropa gazetaro tagojn post la referendumo montras kiel, sendepende de kiun lingvon vi elektas, ne mankas referencoj al la demandoj Kiun lingvon alprenos la rolon de la Angla? Ĉu Eŭropo povos plu paroli la Anglan lingvon? Ĉu la Angla lingvo estos daŭre oficiala?

La esplorado ankaŭ montras varian pritakson de la situacio. Anglalingvaj ĵurnaloj jen atentigas pri la ĵuse pli ofta uzado de la Franca kaj la Germana jen malferme esprimas sian malŝaton pri la ideo de Eŭropo liberiĝinta de la rego de la Angla lingvo. En Francio aŭdigas voĉoj kiuj prezentas la situacion kiel grandan ŝancon por la Franca lingvo kaj en Germanio ne mankas laŭdoj pri la Germana lingvo.

En la centro de la debato troviĝas la Eŭropunia regularo 1/1958. Laŭ tiu ĉi regularo ĉiu lando je aliĝo al la Unio rajtas elekti unu lingvon kiel oficialan lingvon. El nunaj membrolandoj neniu, krom la ĵus voĉdoninta por ekŝiĝo, elektis la Anglan kiel oficialan lingvon. Siatempe Irlando elektis la Gaelan lingvon, Malto elektis la Maltan lingvon kaj Kipro la Grekan.

Krome interpretoj pri tiu ĉi regularo ŝajne varias de lingva versio al lingva versio. La fakto estas ke tiu ĉi regularo okupas centran lokon en la nunaj debatoj kaj plej eble Eŭropaj institucioj en ne malproksima estonteco devos okupiĝi pri ĝia interpreto, apliko aŭ ŝanĝo.

En la revivigita debato ankaŭ partoprenis pluraj Eŭropaj politikistoj kaj membroj de la Eŭropa Parlamento. Sveda Parlamentano Cecilia Wikström eĉ kuraĝis laŭte kaj klare denunci malegalecon en la sino de la Eŭropuniaj institucioj. «Mi ĉiam estis frustrita ke denaskaj parolantoj [de la angla lingvo] havas tiom grandan avantaĝon» ŝi deklaris.



## Civitanaj iniciatoj paŝas al pli egalecema eŭropo

Estas malfacile nun antaŭvidi aŭ prognozi la ŝanĝojn kiuj estiĝos en la venontaj semajnoj aŭ monatoj. Kiam finiĝos la necerteco? Kia estos la rilato inter Britio kaj Eŭropa Unio post la Britelira referendumo? Ĉu ni vidos ŝanĝojn en la lingva sistemo kaj politiko de la Unio? Pluraj demandoj stariĝas sed ankaŭ multaj defioj kaj ŝancoj.

Sed ni ne volas kalkuli nin inter la nenifarantoj, tial en la lastaj semajnoj ni lanĉis du projektojn. Ili intencas agadi en du malsamaj frontoj sed kundividas komunan fundamenton.

La unua ludas rolon en la komunika, protesta kaj postula fronto. Ĝi celas diskonigi kaj postuli reagon de la eŭropaj parlamentanoj pri lingva malegaleco en Eŭropa Unio. La dua, Eŭropano, ludas rolon en la alternativkonstrua fronto. Ĝi celas efektivigi praktikan uzadon de Esperanto kadre de Eŭropa Unio. La unua piliero de Eŭropano estas ĵurnalisma sed la projekto pli amplekse celas nutri Eŭropan komunan konversacion.

La komuna fundamento de tiuj ĉi projektoj estas batalo kontraŭ malegaleco kaj ekkontrolo de alternativoj. Ni jam paŝas al pli egalecema Eŭropo.

Manuel Ortega

Membro de la grupo de kooperativoj «las Indias»  
<https://europano.info/>



# Duolingo por hispanparolantoj Isaac Santiago



Duolingo estas la plej uzata telefona aplikaĵo por senpage lerni lingvojn. En Aŭgusto 2016 aperos en Duolingo kurso de Esperanto por hispanparolantoj, antaŭ ĝia lanĉo jam estis aliĝitaj preskaŭ 14.000 studentoj. Ĝuste en Majo 2016 la kurso de Esperanto en Duolingo por anglaparolantoj fariĝis unu jara, ĝi nun havas pli ol 440.000 studentojn.

Nur 10 lingvoj estis lerneblaj por anglaparolantoj antaŭ majo 2015, poste estis lanĉitaj la kursoj de Esperanto, ukraina kaj norvega. Por hispanparolantoj, nur estis lerneblaj 6 lingvoj kaj en aŭgusto 2016 aperis la kursoj de Esperanto kaj gvarania.

Duolingo estis en 2015 la aplikaĵo por poŝtelefono pli elŝutita en Android en la fako pri lernado, kun pli ol 120 milionoj da uzantoj.

Duolingo estis lanĉita oficiale en junio 2012, ĝia fondinto estis Luis von Ahn, li naskiĝis en Gvatemalo en 1979. Li studis matematikon en la Universitato de Duke en Norda Kalifornio – Usono kaj doktoriĝis pri komputila scienco de la Universitato Carnegie Mellon en Pensilvanio – Usono. En 2012 la prezidanto de Usono, Barack Obama, donis al li premion de honora junulo en scienco kaj inĝenerio.

La kurso de Esperanto en Duolingo por anglaparolantoj estis ektradukita en novembro 2014, fare de teamo gvidita de Chuck Smith, usonano kiu loĝas en Germanio. En 2015 li estis elektita kiel la esperantisto de la jaro, premion kiun donas la revuo la Ondo de Esperanto.

En Duolingo la uzantoj lernas lingvojn facile kaj amuze kiel se temus pri ludo, se la uzanto eniras unufoje li devas elekti ĉu eklerni la lingvon aŭ fari teston por plialtigi la nivelon. Ankaŭ la studento elektas ĉu lerni po 5, 10 aŭ 15 minutoj tage. La poŝtelefono memorigas fari la ĉiutagan lecionon.

La niveloj sin dividas en elementoj pri gramatiko aŭ vortolisto, ĉiu elemento sin dividas en lecionoj. La lernantoj nur povas vidi la unuajn, la aliaj estas fermitaj kaj oni devas fini la unuajn por malfermi la sekvantaj. Ĉiam eblas salti al lecionoj pli altnivelaj, sed oni devas fari etan ekzamenon.






Kiam oni faras lecionon oni ricevas poentojn da sperto kaj ingotojn kiujn oni povas ŝanĝi kontraŭ aliaĵojn kiel specialaj vort-listoj. Ju pli sekvantajn tagojn oni lernas des pli poentojn oni gajnas. Ankaŭ oni povas aldoni amikojn por sekvi iliajn poentojn kaj nivelojn por konkuri.

Por fini lecionon oni devas: elekti la ĝustan vorton el aliaj, elekti la ĝustan tradukon aŭ traduki frazojn de la lernanta lingvo al la gepatra aŭ male, aŭskulti kaj skribi kion oni aŭdas, ripeti kion oni aŭskultas per mikrofono kaj aliaj pli.

Por trovi la plej taŭgan formon de la kurso, la sistemo ne montras la saman ordon de la lecionoj al ĉiu lernanto, poste la sistemo uzos la ordon de tiuj kiuj pli bone lernis.

Sciante la kvanton da lernantoj de la kursoj kaj kompare kun la kvanto da parolantoj, oni povas taksii la kvanton da esperantoparolantoj. La averaĝa kvanto da lernantoj de duolingo kompare kun la kvanto da parolantoj estas 16,5%. Tio signifas ke la 443.000 personoj kiuj studas Esperanton en duolingo, povas esti la 16,5% el la esperantoparolantoj, tio estas do 2.684.848 parolantoj de esperanto, kvanto kiu estas tre simila al la plej kutimaj taksoj.

Duolingo ne nur helpas lerni Esperanton, ankaŭ povos esti la plej granda reklamilo por la internacia lingvo. Multaj homoj rimarkos ke Esperanto devas esti tre grava lingvo pro tio ke nur kelkaj lingvoj estas disponeblaj en la kurso.



Lingvo	Lanĉo	Uzantoj 2016
HISPANA	Jun-2012	60.800.000
FRANCA	Jun-2012	36.500.000
GERMANA	Jun-2012	23.100.000
PORTUGALA	Okt-2012	6.330.000
ITALA	Dec-2012	14.500.000
NEDERLANDA	Jul-2014	2.220.000
SVEDA	Nov-2014	2.030.000
IRLANDA	Nov-2014	1.840.000
DANA	Nov-2014	1.090.000
TURKA	Mar-2015	1.340.000
NORVEGA	Maj-2015	744.000
<b>ESPERANTO</b>	Maj-2015	443.000
UKRAINA	Maj-2015	400.000

Kursoj de Duolingo por angloparolantoj.

Kvanto da Parolantoj	Averaĝa kvanto da lernantoj
518.000.000	0,117
229.000.000	0,159
130.000.000	0,178
209.000.000	0,030
66.000.000	0,220
38.000.000	0,058
10.000.000	0,203
2.800.000	0,657
6.000.000	0,182
72.000.000	0,019
5.000.000	0,149
41.000.000	0,010
	0,165





# La plej alta telfero el la mondo leviĝas en Venezuelo

Andrea Araque



La unua telfero en la mondo estis konstruita per Leonardo Torres Quevedo, en la urbo San Sebastián (Hispanio), en la jaro 1907, por ebligi al la aristokrataro supreniri sen problemoj la pinton de la monto Ulía.

Post 109 jaroj, en la mondo estas pli ol 60 telferoj, situantaj en diversaj lokoj de la mondo. Pro tio, ĝui promenon en telfero fariĝis unu el la plej bonaj atrakcioj, kiujn kelkaj urboj prezentas al siaj turistoj kaj vizitantoj, ĉar tio ebligas havi panoraman vidon de lokoj kiuj fariĝas magiaj kiam oni vidas ilin de la alteco, tia malproksima vidpunkto kaj nekutima por la homoj, permesas akiri mallaciĝon, tiel, malmultaj emocioj povas konkuri kontraŭ la sensacio de flosi tra la ĉielo, vidi abismojn kaj valojn ekde miloj da metroj malproksime.

El la telferaj sistemoj kiuj hodiaŭ suprenirigas milionojn da personoj sur lokojn kie la pleneco spireblas, distingiĝas diversaj el ili pro diversaj kialoj, ekzemple: Genting (Malajzio), estas la telfero plej rapida el la mondo; Pão de Açúcar (Brazilo), la plej reprezenta el la mondo; Aiguille Du Midi (Francio) estas katalogita kiel la plej pentrinda; Stanserhorn Cabrio (Svislando), estas la unua telfero kun la supra etaĝo sen tegmento; Tittlis Rotais (Svislando) uzas la unuan girantan budon el la mondo; Peak 2 Peak (Kanado) en la mondo nur ĝi estas telfero kiu kontaktas la pintojn de du montoj; Mi Teleférico (Bolivio) estas la telfero por urba uzo plej alta kaj longa el la mondo; kaj Skyline Queenstown (Nov-Zelando) estas la telfero plej vertikala el la Suda hemisfero.

Nuntempe, en Venezuelo leviĝas kelkaj telfersistemoj, el kiuj distingiĝas la telfero de Merido. Nomiĝita per la nomo uzita de la unuaj loĝantoj de la urbo por nomi la nunan Sierra Nevada, Mukumbarí (indiĝena vorto kiu signifas loko kie dormas la Suno), estas la moderna kaj rekonstruita versio de la antaŭa telfero kiu estas ĉefa ikono de la urbo.





La projekto estis gvidita de la inĝeniero José Martínez, prezidanto de VENTEL, kaj George Kobel, direktoro de projekto kaj reprezentanto de Dopelmayr, entrepreno aŭstra-svisa. Post malfacila konstrua etapo, sur preskaŭ 5.000 metroj da alteco, kun ventoj de 80 kilometroj en horo kaj centigradoj sub nulo da temperaturo, kiu komencis en 2008, en aŭgusto 2016 la telefero fine estos malfermita al la publiko.

Mukumbari revivas forte, ĝi estas estas kvalifita kiel la plej alta telfero el la mondo, kun alteco de 4.765 metroj sur la marnivelo. Tiu grandioza konstruaĵo grimpas la ĉarmajn kaj inspirantajn andajn montojn, pere de 12,5 kilometroj da vojaĝo, kio fariĝas la dua plej longa telfero el la mondo, nur pro 700 metroj da diferenco.

Mukumbari transportas ĝiajn vizitantojn en 8 budoj, ĉiuj el ili povas transporti 40 personojn sidantajn kaj 20 starantajn. Ĝi disponas staciojn ekipitajn kun avangarda teknologio, restoracioj, haloj por eventoj, muzeoj, ŝirmejoj kaj observejoj, en kiuj 43 malsamaj entreprenoj oferos servojn kaj produktojn rilatigitajn kun la monta kunteksto.

Krome ĉio, la sperto en Mukumbari intensiĝas, ĉar disponas 12 padojn kun aliro al natura areo sen media damaĝo, sur kiuj videblas birdoj de la anda paramo, ĝi inkludas 35 kelkcentjarajn vojojn kaj botanikan ĝardenon de frajlehonoj, tipa planto de la anda paramo; vojon de monta pad-marŝado kun destino al la 4a telferstacio; ankaŭ eblos fari montan bicikladon kaj ekstremajn sportojn kiel viaferatao (vertikala kaj horizontala) en la lasta ĉenero de la monto, ankaŭ estos la ŝanco de descendi la monton per glisparaŝuto, reprezenta sporto en la disvolvo de la nova turisma koncepto de la telfera sistemo.

Per tiuj amuzaĵoj, la plej alta telfera sistemo el la mondo, Mukumbari, impulsos la turismon naturan kaj montan, kun la ĉefa celo de alloge transporti la personojn ĝis 4.765 metroj sur la marnivelo, loko kie la turististoj havos la ŝancon senti la altecon kaj senliman rigardon perceptitan ekde tie, tio definitive valorigas la 680 milionojn da dolaroj investitaj por revivi la telferan sistemon, kiu hodiaŭ ricevas la nomon Mukumbari, la plej alta el la mondo.



## La 11a Venezuela Esperanta Renkontiĝo

La 11a Renkontiĝo de Esperanto en Venezuelo okazos en la urbo Merido, de la 26a ĝis la 28a de Aŭgusto 2016. Unue oni nomis ĝin kiel la 1a Venezuela Esperanto-Kongreso ĉar la aliaj renkontiĝoj okazis jam delonge en la okdekaj kaj naŭdekaj jaroj kaj la lasta en 2002 pro tio oni volis renovigi ilin. Sed bedaŭrinde pro la ekonomika krizo, kiun nun havas la lando, multaj esperantistoj de aliaj landoj ne intencis partopreni la kongreson kaj eĉ multaj esperantistoj de Venezuelo ne povos partopreni, pro tio oni decidis ŝanĝi la nomon al renkontiĝo.




### ● Kastelo de Sankta Ignacio:

Ĝi estas situata preskaŭ 3.000 metroj sur la marnivelo kaj ĝi funkcias kiel hotelo. Ĝi troviĝas proksime al la lago Mukubají.



### ● Katedralo de Merido:

Ĝi estis konstruita en la komenco de la 19a jarcento. La katedralo estis renovigita en 1958, kadre de la 400a datreveno de la fondiĝo de la urbo. Ĝi situas en la historia centro de la urbo.



### ● Neĝita Montaro:

La plej alta parto de la lando, kun pintoj pli ol 4.000 metroj altaj. La plej alta pinto nomiĝas Bolívar kun 4.980 metroj de alteco. Tie troviĝas la plej alta telfero de la mondo Mukumbarí kun alteco de 4.765 metroj.





# Cronograma del 11° Encuentro Venezolano de Esperanto

## Viernes, 26 de agosto

Aulas Mérida, Aula A1

10:00 am Inauguración.

12:00 pm Almuerzo

01:00 pm VEA sinprezentas Ricardo Coutinho

01:20 pm Fotografías 3D Isaac Santiago

02:00 pm Diabete Jesús Cedeño

02:30 pm Kiel la movado progresiĝos?

Ricardo Coutinho kaj Juan Miranda

03:00 pm Muziko

03:40 pm Recurso renovables y amigables al ambiente Christian Ponsio

04:10 pm Uso de herramientas de persuasión en la cotidianidad Elsa Angulo

04:40 pm Muziko

05:00 pm Elementos básicos del Aprendizaje del Esperanto Ricardo Coutinho y voluntarios

05:30 pm El génesis según Alberto Juan Miranda

06:00 pm Medicina alternativa Christian Ponsio

09:45 Entrada al parque Laguna de Mucubají  
Paseos a caballo, degustación de dulces típicos.  
Historia de los páramos merideños en Esperanto.

12:00 Almuerzo Comida al aire libre. Duración: 1-2 horas.

14:00-17:00 Juegos y actividades recreativas

17:00 Regreso a Mérida

Durante el Recorrido, música en Esperanto. Juegos.

19:00 Llegada a Mérida Llegada al terminal de pasajeros.

19:00-21:00 Cena en Restaurant.

## Sábado, 27 de agosto

07:00 Salida excursión a la laguna de Mucubají.  
Encuentro en el terminal de pasajeros de Mérida.

08:30-09:00 Parada en San Rafael de Mucuchíes (Capilla de Piedra) Historia de la capilla de Piedra en Esperanto.

09:15-09:30 Parada en Apartaderos (Parque loca Luz Caraballo) Poema de la loca Luz Caraballo en Esperanto.

## Domingo, 28 de agosto

10:00 am Cierre. Truchicultura Monterrey (aire libre)

Música



### Ŝtona Preĝejo:

Ĝi estis konstruita tute mane fare de Juan Felix Sánchez kaj kelkaj laborantoj inter la jaroj 1980 kaj 1984 uzante nur ŝtonojn, konkajn kaj betonon. Ĝi estis deklarita kultura heredaĵo de Venezuelo.



### Vi povas helpi partopreni en la 11a Venezuela Esperanto-Renkontiĝo!

Malgranda helpo estas grandega por ni!

Vi povas donanci 5 eŭrojn kaj tio estas sufiĉe por la partopreno de unu persono, per via helpo ni atingos 200 eŭrojn. Vi povas helpi pere de la ligilo: <http://desingroup.blogspot.com/>

Alklaku la butonon "Donar" en la suba parto dekstren.

# Potosí, la venezuela Atlantido


Isaac Santiago



En 2003 la preĝejo estis preskaŭ tutvidebla.



Tiel aspektis la vilaĝo antaŭ ĝia malapero.



En 2016 ne nur la preĝejo videblis sed la tutaj ruinoj.

Ekzistis en la andoj de Venezuelo, vilaĝo kiu en 1984 estis tute evakuita kaj inundita por konstrui akvobaraĵon, kiu donus elektron al kelkaj landopartoj.

Post pli ol 30 jaroj sub la akvo sed en la memoro de la personoj, la tuta vilaĝo estas hodiaŭ videbla de ĉiuj, el kiuj multaj deziris denove vidi ĝin.

Laŭ lokaj loĝantoj, la unua fojo kiam oni povis vidi kelkajn ruinojn de la vilaĝo estis inter la jaroj 2009 kaj 2010. La tiama sekeco lasis vidi la plej altan punkton de la vilaĝo; la ĉefa turo de la preĝejo, kiu ekde tiam funkciis kiel mezurilo por montri la forton de la sekeco.

Ĉijare ne nur la turo videblas sed la tuta preĝejo kaj unukilometraj ĉirkaŭaĵoj.

La ruinoj de Potosí estis sub la nova lago ĉe 1.100 metroj sur la marnivelo. Magia loko kondamnita al lasi ekzisti por starigi akvobaraĵon, kiu helpus por la disvolviĝo de la regiono.

Ĝiaj loĝantaroj neniam havis elektran fluon kaj malfacile komprenis kial ilia malapero helpus aliajn personojn havi ĝin.

Hodiaŭ multaj parolas pri Potosí, ĉar ĝiaj restaĵoj estas denove malkovritaj pro la sekeco, kiun alportis la natura fenomeno El-Ninjo.

Potosí estis malgranda vilaĝo kiuj loĝantoj, humilaj homoj, laboris pri la agrokulturo. La vilaĝo estis fondita duone de la 19a jarcento pro la florado de la kafo. La vilaĝo estis komerca centro pri agrokulturo, ĝi havis ŝtonajn mallarĝajn stratojn, kiuj nur ĉirkaŭis la centran placon. La domoj de la kolonia epoko estis kun muroj el tero kaj kano, lignaj pordoj kaj tegmento de tegoloj; ili restis nur en la memoro.

En 1953, estis tutkonstruita la preĝejo kun 26 metroj da alteco, honore al Sankta Isidoro de Madrido, la sanktulo de la terkulturistoj, kiu ŝanĝas pluvon anstataŭ suno.

En 1984 la registaro decidis komenci evakui la vilaĝon kaj dum unu jaro kaj duono la valo estis plenumita de la rivero.

Hodiaŭ la preĝejo estas videbla kaj estas turisma vidindaĵo ne nur por najbaroj. Kvankam ne estas la unua fojo. En 1998 la plej alta parto de la turo de la preĝejo elstaris, El-Ninjo komencis montri siajn efikojn. En 2003, preskaŭ la tuta preĝejo videblis. Sed dum 2010, kiam la sekeco estis pli forta, la tuta preĝejo elstaris.



Ses jaroj poste, El-Ninjo denove alvenis al la Venezuela Atlantido, nun ne nur la preĝejo videblas sed ankaŭ la tutaj ruinoj. Fakte, okazis di-servo en la preĝejo kie renkontiĝis la antikvaj loĝantoj de la vilaĝo.

La natura fenomeno El-Ninjo naskiĝas en la ekvadora regiono en la pacifiko, ĝi identiĝas pro la nenormalaj temperaturaj kondiĉoj sur la maro kaj atmosfero. Tiu fenomeno jam malhelpis 60 milionoj da personoj en la tuta mondo, pro tio la registaro ŝparigis la elektran fluon, tio estis farita de diversaj manieroj: per interrompo de la elektra fluo dum tri, kvar kaj eĉ ĝis ok horoj ĉiu tage; donante al la ŝtataj laborantoj unu, du aŭ tri plian senlaboran tagon semajne; kaj eĉ ŝanĝante la horzonon de -4:30 GMT ĝis -4:00 GMT.

Inundoj en la marbordo de Peruo kaj Ĉilio, malhelpo pri la paso de grandaj ŝipoj en la kanalo de Panamo, grandaj sekecoj en Kolombio kaj Venezuelo, ĉiuj estas la konsekvencoj de El-Ninjo kiuj memorigas la nekompatemon kaj gravecon de tiu natura fenomeno.

Fakte ekzistas kelkaj vilaĝoj kiuj estis inunditaj kun intenco de la homo, tiuj estas: Shi Cheng en Ĉinio, Petrolandia en Brazilo, Santo Tomás de los Plátanos en Meksiko, Vilarinho das Furnas en Portugalio, Mediano en Hispanio, Kaliazin en Rusio, Catskill en Novjorko kaj St. Thomas en Nevado.


Multaj landoj provis serĉi solvon pro manko da akvo en grandaj urboj aŭ generi elektran kurenton. Por povi fari tion estis necese lasi vilaĝoj sub la akvo lasante kelkajn aĵojn elstaritaj.



En 1998 la turo komenciĝis elstari.



Kaliazin estis inundita dum la dua mondmilito.



En Mediano (Hispanio) elstaras turo de la 16a jarcento.



## La 68-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO 21-28 Majo 2016

Raportas: Liba Gabalda

La ĉi-jara IFEF-kongreso okazis sur la balkana duoninsulo en Bulgario. La kongresejo troviĝis ĉe la bordo de la Nigra Maro proksime de Varna en ripozkomplekso »Sanktaj Konstantin kaj Elena» kun vizitinda samnoma monaĥejo. La programo de la kongreso okazis en la domo de sciencistoj, kiu funkciis ankaŭ kiel hotelo. Pluraj esperantistoj loĝis en apudaj hoteloj malpli kostaj kaj pli bonaj. Kelkaj bulgaroj ĉeestis nur partatempe. La ĉefaj organizantinoj Petja Aleksandrova kaj Veselka Kamburova komisiis eventorganizan oficejon, kies prizorgantinoj vere tre kompetente zorgis pri nia bonfarto kaj dum la tuta aranĝo ili ĉiam ĉeestis.



La kongreson partoprenis pli ol naŭdek esperantistoj el dek du landoj. Ĉeestis gastoj el Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉinio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Pollando kaj Rumanio. Post la inaŭguro reprezentantoj de ĉiuj menciitaj landoj plantis diverskolorajn rozojn en la ĝardeno antaŭ la kongresejo. La rozo simbolas Bulgaron. Oni povas aĉeti vastan gamon de produktoj faritaj el ĝi; ĉefe parfumojn, kosmetikaĵojn, sed ankaŭ marmeladon, mielon, likvoron, diversajn dolĉaĵojn, memoraĵojn kaj vestaĵojn kun rozmotivoj. Ankaŭ en niaj kongres-sakoj ne mankis memoraĵoj kaj rozparfum-flakoneto en bele dekoraciita ligna ujo.

Agrabla surprizo atendis nin antaŭ la inaŭguro. Folklorvestita kantistino Kalinka Raĉeva proponis al ĉiu alvenanto bulgaran panon kun spicaĵo kaj ĉiuj ricevis donace ceramikan ujeton kun Esperanto-surskribo por memori la kongreson. Ni tostis per la konata bulgara brando Rakija. Dum la inaŭguro, kiel kutime okazis paroladoj kaj salutadoj de unuopaj landaj asocioj kaj aliaj instancoj. Martin Stuppnig prezentis sian libron pri militaj impresoj kun titolo: « Home en Senhomeco ». Ne mankis festparolado de la prezidantino de IFEF Rodica Todor, kiu ĉe la fino malfermis la kongreson. Post tio ni fotiĝis antaŭ la kongresejo.

La temoj de la kongreso estis bone pritraktataj. Temis pri: « La fervojo de la estonteco » kaj « La lingvoj kiel rimedo ». La programo enhavis kunsidojn de la IFEF estraro, laŭtemajn konferencojn, kunsidojn de la faka komisiono, fakprelegetojn kaj la plenkunsidon. Oni parolis pri movadaj aferoj, pri statut-ŝanĝoj. Kunvenis terminara kaj fake aplika sekcioj. Estis prezentitaj estraraj raportoj de la sekretario, redaktoro kaj kasisto. Por sekvaj tri jaroj ekfunkcios nova estraro, kiun oni surloke elektis. Verdire ne estis ŝanĝo, prezidanto daŭre estas Rodica Todor, sekretario Vito Tornillo, kasisto Laurent Vignaud, nur elektiĝis nova redaktoro Guido Brandenburg pro demisio de István Gulyas. Ne mankis alloga prezento pri la venontjara IFEF-kongreso en Colmar (Francio) kaj elekto de Pollando por la jaro 2018. Estis honorigitaj kelkaj elstaraj esperantistoj pro ilia poresperanta laboro. Restis tempo por promenoj en la ĉirkaŭaĵo, aŭ laŭ la marbordo. Tamen ne multaj kuraĝis bani sin en malvarma maro. Pluraj profitis sunan veteron por sunumado. La 24-an de majo

Ni ĉeestis kaj spektis la paradon de diversaj lernej-grupoj, sport-organizoj, intelektuloj, profesoroj, muzikistoj, maĵoretinoj, (uniformitaj knabinoj) maristoj ktp. Homoj bele kaj feste vestis sin, portante bulgarajn flagojn kaj florojn. Infanoj svingis per flagetoj aŭ per koloraj balonetoj. Adoleskuloj portis kaj montris diversajn banderolojn aŭ portretojn de Kirilo kaj Metodo. El laŭtparolilo sonis anoncoj pri ĵus preterpasantaj grupoj. Ambaŭflanke de la trotuaroj staris homoj aplaŭdante kaj svingante per floroj aŭ flagetoj. Bela suna vetero kontribuis al entuziasmo kaj ĝojo. Ŝajnis, ke la manifestacio ne havos finon... ni pasigis tie la tutan matenon.

La kongresaj vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programoj. Dum la Interkona Vespero kantis por ni la fama bulgara kantistino Violeta Balkanska kaj alia talenta kantistino Kalinka Raĉeva. Ankaŭ dum la nacia vespero ni ĝuis kantojn kaj folklorajn dancojn kaj kundancis. Alia danceblo prezentiĝis dum la Esperanto-vespero. Impona estis adiaŭa vespero kun festa vespermanĝo, kiu okazis en apuda bulgarstila taverno « Kopitoto ». Vigla muziko animis la vesperon kaj incitis al plua dancado. Dum la vespermanĝo ni spektis folklorajn dancojn kaj kantojn, viziton de amuza azeno kaj eksteran danĉmarŝon sur ardantaj karboj.

Okazis du duontagaj ekskursoj: al Varna kaj al Nesebâr. En Varna ni vizitis la pramstacion kaj porvizitantan centron kun maketo demonstranta la tutan komplekson. Poste ni iom trarigardis la urbon kaj la ekskurso finiĝis en vinkelo, kie ni gustumadis kelkajn specojn de bulgaraj vinoj kun eblo aĉeti ilin. En Nesebâr ni admiris antikvan urbon, kelkajn preĝejojn kaj fortikaĵajn murojn. Ĉe la marbordo ni nutris mevojn.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la mezepoka kaverna monaĥejo Alaĝa kaj muzeo. Poste ni veturis al la urbo Balĉik kaj promenis en ties botanika ĝardeno admirante belegajn multkolorajn rozojn. Impresis somera rezidejo « La palaco » de la rumana reĝino Maria kaj apuda minareto, de kie oni vidas la maron. Laste ni vizitis la kabon Kaliakra dum pluvega vetero. La postkongreso okazis en Veliko Tarnovo.

Dum la solena fermo estis transdonita la IFEF-flago al francaj reprezentantoj de la venontjara 69-a IFEF-kongreso okazonta de la 16-a ĝis la 23-a de majo 2017. Ĝis revido en la pitoreska alzaca urbo Colmar.





Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda.

## La kvatro Jezer Dorante

Ekde kiam la hispanoj alvenis al nia lando, en la jaro de 1498, komenciĝis la sinkretismo inter la indiĝena kaj la hispana kulturo ĝis fariĝi mem en la aktuala kulturo kiun ni havas nun. Ekde manĝaĵoj ĝis nia vestmaniero ni havas spurojn de la originala hispankulturo. Nia muziko havas tiujn hispanajn spurojn, ĉar eĉ la Kvatro (Venezuela tradicia muzikilo) estas la rezulto de la hispana gitaro.

Indiĝena legendo diras ke hispanoj alportis siajn muzikilojn en tiun ĉi landon, kaj ili ĉiam ludis dum ĉiu nokto apud indiĝenoj kiuj vidis tiun strangan sed sonoratan muzikilon. Ili ŝatis ĝiajn sonojn kaj pro tio ili volis fari muzikilon kiel hispana gitaro. La hispandomo ĉiam estis malproksima al indiĝendomo kaj indiĝenoj alproksimiĝis sufiĉe por vidi la formon de la gitaro; pasinte la tempo, kaj multaj jaroj, ili fabrikis muzikilon kun la gitarformo sed pli malgranda ol la originala, la kordoj estis faritaj el naturaj kordoj sed ili estis malfortaj, poste ili uzis intestojn de bestoj ĝis la invento de la nilonaj kordoj. La nova muzikilo kreita por la indiĝenoj ne havis ses kordojn kiel la gitaro, ĝi havis kvar kordojn; eble pro tio la nova muzikilo estis nomita "Kvatro".

Dum multaj jaroj ĉio evoluis, eĉ muzikiloj kaj nia Kvatro ankaŭ evoluis pri sia uzo. Iom post iom la formo de ludila Kvatro ŝanĝiĝis kaj nuntempe ekzistas multaj manieroj por ludi ĉi tiun venezuelan muzikilon; oni ludas la Kvatron kun "rasgeo" kaj aliaj personoj ludas ĝin kun "punteo". Ambaŭ estas diversmanieroj por ludi ĉi tiun muzikilon.



Giganta kvatro en la urbo Barquisimeto.



## Kranio, ludo en Esperanto Isaac Santiago

Dum la 100a universala kongreso de Esperanto en Lillo-Francio 2015, en la junulara programo kaj ankaŭ en la kongresejo oni ludis kranion, ludo kiu estas la esperanta versio de Cranium. Tiu ludo plaĉas al multaj ĉar ĝi estas tre diversa. Oni devas fari diversajn defiojn kiel: desegni, desegni sen vidi, modli paston, aktori, zumi kanzonojn, respondi demandojn, eĉ literumi malantaŭen. Tio por ke la aliaj samgrupanoj divenu la vorton. La plej kutima ludo estis 2 teamoj kun 4 teamanoj ĉiu. En ĝi partoprenis ludantoj de Argentino, Brazilo, Ĉinio, Domingo, Francio, Hispanio, Hungario, Irlando, Kanado, Meksiko, Rusio, Slovakio, Usono, Venezuelo kaj Vjetnamio.

La ludo jam havas sian retpaĝon kie oni povas elŝuti ĝin. <http://esperanto-es.weebly.com/kranio.html>



Tiu defio temis pri pere de marioneto (alia teamano) divenigi la vorton, kiu estis "gvidanto".





## Por qué el Esperanto...



Jesús Cedeño. Estado Bolívar. No recuerdo precisamente cuándo escuché sobre el Esperanto por primera vez. Eso ocurrió a mediados de los años ochenta, cuando leí un artículo corto sobre el idioma internacional en un periódico. La idea de una herramienta de comunicación internacional y neutral me interesó mucho, pero de ninguna manera encontré más información en ese momento. Sin embargo mis ganas de aprender ya estaban despertando. Algunos años después con acceso a la red y comencé rápidamente a buscar información sobre ese idioma interesante. Luego de leer un poco comencé a aprenderlo a través del curso gratuito por correspondencia ELNA. Recuerdo que lo estudié durante mi último año de Medicina, a menudo hacía los ejercicios del idioma a media noche pacientemente. **Tiel komenciĝis mia vojaĝo tra Esperantujo.**



Felix Martínez, 24 años, Estado Lara. Siempre me ha gustado la lectura en diversas áreas y el autoaprendizaje, conocí el idioma leyendo uno de mis libros favoritos de una conocida autora chilena, allí vi la palabra Esperanto, una lengua internacional que se describe como una lengua amable familiar multicultural y que une naciones, empecé a investigar más por canales como Youtube y Google, sorprendiéndome que yo también podría aprender esta lengua por mi cuenta sin tanta dificultad con tanta información que encontré, al conocer las primeras palabras quede sorprendido con lo bonito que se escuchan y bueno lo demás ha sido historia. **Dankon al ĉiuj.**



Juan Miranda, Caracas. Escuché sobre el Esperanto por primera vez hace 35 años cuando estudiaba secundaria. Pero no pude contactar con nadie en ese momento. Volví a escuchar sobre el idioma en la radio en el 2006, así que me comuniqué con la Asociación Venezolana de Esperanto y dos meses después me encontré con el profesor Juan Negrete. Comencé a aprenderlo como un juego. **Mi ankoraŭ faras tion pro tio.**



Reni Molina. Estado Mérida. Soy profesor de idiomas, hablo inglés, francés y portugués. Hace muchos años un amigo (mi profesor de francés) me habló del Esperanto pero él dijo que el idioma era solo para congresos y yo le dije que no quería aprender un idioma solo para congresos. Hace dos años un amigo de Brasil me habló del Esperanto nuevamente y me dijo que estaba en un grupo de Esperanto y le dije que también quería estar ahí. Comencé a aprender este bello idioma. **Mi pensas ke tiu lingvo tre gravas.**



Jossué Belandria. Estado Mérida. Conocí el Esperanto en una reunión de un grupo de políglotas que tenemos en Mérida. En cada reunión, alguien suele enseñar lo básico de algún idioma, en una de ellas fue el Esperanto. Me llamó la atención la facilidad que tiene en la construcción de frases e interpretación que puede tener un hispanohablante, de hecho, conversamos sobre qué tan fácil era para un chino, estadounidense o de cualquier sitio para aprenderlo y las conclusiones fueron básicamente: para todos es fácil, con un poco de empeño en 1 mes o 2, ya se puede hablar bien. No es una lengua nativa como tal, pero es auxiliar y universal.



# Directorio de Asociaciones en América

El Movimiento Esperantista (la *Movado*) es muy amplio y diverso. En todo el mundo hay una variedad de clubes, organizaciones, asociaciones, editoriales, institutos, etc, dedicados a la difusión y el uso del idioma internacional Esperanto. En este directorio te mostramos las páginas oficiales de las principales asociaciones de Esperanto en América. Presta especial atención a las páginas y recursos de asociaciones en países de habla hispana, puesto que podrás aprovechar tu lengua materna (el español), para aprender Esperanto o para participar en los eventos y encuentros en todo el continente.

## CANADÁ

Esperanto en Canadá: <http://www.esperanto.ca/>  
 Esperanto-Societo Kebekia: <http://www.esperanto.qc.ca/eo>  
 Boletín La Riverego: <http://www.esperanto.qc.ca/eo/riverego>

## ESTADOS UNIDOS DE NORTEAMÉRICA

Esperanto-USA: <http://www.esperanto-usa.org/>  
 Usona Esperantisto, boletín de Esperanto-USA:  
<http://bulteno.esperanto-usa.org/>  
 Sociedad Esperantista de Washington: <http://www.esperantodc.net/>  
 Sociedad Esperantista de New York: <http://www.esperanto-nyc.org/>  
 Esperantic Studies Foundation: <http://esperantic.org/en/>  
 Editorial Mondial: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

## CUBA

Asociación Cubana de Esperanto: <http://www.esperanto.cult.cu/>  
 Radio Havano Kubo: <http://www.radiohc.cu/eo/>

## MÉXICO

Federación Mexicana de Esperanto:  
<http://esperanto-mexico.org/>  
 Revista *Ni ĉiuj*:  
<http://esperanto-mexico.org/es/nicxiuj>  
 Asociación Mexicana de Esperanto:  
[http://meksikoesperanto.org/el\\_esperanto\\_en\\_mexico.htm](http://meksikoesperanto.org/el_esperanto_en_mexico.htm)

## VENEZUELA

Asociación Venezolana de Esperanto:  
<http://www.esperanto-venezuela.org>

## BRASIL

Brazila Esperanto-Ligo: <http://esperanto.org.br/bel/>  
 Brazila Esperantista Junulara Organizo: <http://bejo.esperanto.org.br/>  
 Esperanto @ Brazilo (portugués): <http://esperanto.brazilo.org/wp2/>  
 Esperanto Ilustrado (portugués) :  
<http://www.esperantoilustrado.blogspot.com.br/>  
 Esperanto Ilustrita (esperanto):  
<http://www.esperantoilustrita.blogspot.com.br/>  
 Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>  
 Esperanto-Asocio de San-Paŭlo: <http://easp.org.br/portal/>

## COLOMBIA

Liga Colombiana de Esperanto:  
<http://www.oocities.org/kolombio/>  
 Kolombia Esperanto-Ligo:  
<http://esperantokalio.blogspot.com/>

## URUGUAY

Urugvaja Esperanto-Societo: <http://www.esperanto.org.uy/>

## CHILE

Asociación Chilena de Esperanto:  
<http://esperanto.cl/>  
 Juventud Esperantista Chilena:  
<http://chejo.blogspot.com>

## ARGENTINA

Liga Argentina de Esperanto: <http://www.esperanto.org.ar/>  
 Blog de la Liga: <http://argentinaesperantoligo.blogspot.com.ar/>  
 Bonaera Esperanto-Asocio: <http://esperanto-bea.blogspot.com/>



# Esperanto: Movimiento Internacional

El Movimiento Esperantista es un movimiento verdaderamente internacional, multicultural, que reúne en un solo esfuerzo muchas culturas, pueblos y naciones, sin discriminación de razas, idiomas, religiones o inclinaciones políticas. Esperanto significa idioma pero también significa cultura internacional, derechos humanos, democracia y justicia social. Todas las asociaciones y hablantes del idioma internacional tienen un centro común, la Asociación Universal de Esperanto, que organiza, entre otras cosas, los Congresos Universales de Esperanto que se llevan a cabo en una ciudad del mundo una vez cada año.

## ASOCIACIÓN UNIVERSAL DE ESPERANTO y otras organizaciones esperantistas

Asociación Universal de Esperanto (UEA):  
<http://www.uea.org/info/hispana.htm>

UEA en Facebook:  
<https://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio>

Centro multilingüe sobre el Esperanto: <http://esperanto.net/>

Unión Europea de Esperanto: <http://www.europo.eu/eo/chefpagho>

Liga Internacional de Pedagogos Esperantistas:  
<http://www.ilei-mondo.info/page.php?pid=6565769>

edukado.net: <http://edukado.net/>

Academia Internacional de las Ciencias San Marino:  
<http://www.ais-sanmarino.org/index.htm>

Asociación Mundial Anacional: <http://www.satesperanto.org/>

Academia de Esperanto: <http://www.akademio-de-esperanto.org>

## Periódicos y revistas en línea

Revista Kontakto (revista juvenil): <http://kontakto.tejo.org/>

Eŭropa Bulteno (Boletín de Eŭropa Esperanto-Unio):  
<http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

Libera Folio: <http://www.liberafolio.org/>

La Ondo de Esperanto y editorial Sezonoj: <http://esperanto.org/Ondo/>

La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Le Monde diplomatique: <http://eo.mondediplo.com/>

La Esperanto-centro EVENTOJ: <http://www.eventoj.hu/>

La Esperanta Gazetejo: <http://www.gazetejo.org/gazetoj>

Ĉina Radio Internacia: <http://esperanto.cri.cn/>

El Popola Ĉinio (Desde la China del Pueblo):  
<http://esperanto.china.org.cn/EL/EL/EIPopolaCxinio/>

Monato (actualidad, noticias y opinión): <http://monato.esperanto.be/>

Usona Esperantisto (Esperantista estadounidense):  
<http://bulteno.esperanto-usa.org/>

## En España

Federación Española de Esperanto:  
<http://www.esperanto.es/hef/>

Hispana Esperantista Junulara Societo:  
<http://www.esperanto.es/hef/index.php/hejs>

Asociación Catalana de Esperanto:  
<http://www.esperanto.cat/web/?lang=ca>

Kataluna Esperanto-Junularo:  
<http://esperanto.cat/kej/ca>

Kataluna Esperantisto (revista):  
<http://www.esperanto.cat/web/KatalunaEsperantisto?lang=ca>

Arunda Esperanto-klubo:  
<http://esperantoarunda.blogspot.com/p/eventos-eventoj.html>

Asociación Andaluza de Esperanto:  
<http://andaluciaesperanto.blogspot.com/>

## Radios y podcasts

Radio Vatikana (Ciudad Vaticano):  
<http://www.radiovaticana.va/esp/index.asp>

Radio Havano Kubo (Cuba): <http://www.radiohc.cu/eo/>

Muzaiko (Internacional): <http://muzaiko.info/>

Pola retradio (Polonia): <http://pola-retradio.org/>

Kern.punkto (Alemania): <http://kern.punkto.info/>

Peranto (Alemania): <http://members.aon.at/aldone/retradio/>

3ZZZ Radio en Esperanto (Australia):  
<http://melburno.org.au/3ZZZradio/>

Varsovia Vento (Polonia): <http://www.podkasto.net/>

## Editoriales

Eldonejo Impeto: <http://impeto.trovu.com/>

Mondial: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

Flandra Esperanto-Ligo: <http://www.esperanto.be/fel/>

Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>

Eldona Esperanto-Societo: <http://www.algonet.se/~eldona/>

KAVA-PECH: <http://www.kava-pech.cz/index-esperanto.html>

Libros de la serie Stafeto de Juan Régulo Pérez:  
<http://www.esperanto.be/fel/but/stafeto.php>

# Partoprenu la 11an VER!

Malkovru la andojn!

## Ĝeneralaj informoj pri Venezuelo kaj Merido

### Situo

Venezuelo situas norde de Sudameriko, ĝia kontinenta areo ampleksas 916.445 km<sup>2</sup>. Ĝi limas 3 landojn: Kolombio, Brazilo kaj Gujano.

Merido situas en la sudokcidenta parto de la lando, je la fino de la Anda Kordilero inter la plej altaj montoj de la lando. La plej alta monto estas La Bolivara Montopinto (4890 metroj), videblas el la urbo kaj estas kovrita de neĝo la tutan jaron.

### Loĝantaro

Venezuelo havas proksimume 27 227 930 loĝantojn. Ĉirkaŭ 12% el ili, vivas en la ĉefurbo. Merido havas ĉirkaŭ 330 287 loĝantoj.

### Vetero kaj klimato

En Aŭgusto la temperaturo en Merido povas varii inter 22° C kaj 31° C, kaj foje pluvas.

### Lingvoj

La hispana estas la oficiala lingvo en la tuta lando, en Merido eblas trovi anglaparolantojn en hoteloj kaj la flughaveno.

### Mono

La oficiala mono estas Bolivaroj (Bs.). En Venezuelo Dolaro kaj Eŭro tre alte valoras, pro tio vi povas ŝpari sufiĉan monon.

<http://esperantovenezuela.weebly.com/11a-ver-2016.html>



VENEZUELA STELO  
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.  
Telefonnumero: 58 0212 6629224.  
[www.esperanto-venezuela.org](http://www.esperanto-venezuela.org)  
[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)



Revista oficial de la Asociación Venezolana de Esperanto.